

Francaj vitokultivistoj riskas malliberiĝon, ĉar ili rifuzas poluadi !

Karaj geamikoj,

Emmanuel Giboulot, vinberkultivisto en la regiono Côte-d'Or, ekde pli ol kvardek jaroj ekspluatas 10 hektarojn da vinberujoj laŭ biologia kultivado.

Je la 24a de februaro 2014 ili aperu antaŭ la deliktopuna tribunalo pro rifuzo ŝpruci danĝeran pesticidon sur siajn vinberujojn. Ili riskas kondamnon al 6 monata malliberiĝo kaj monpuno de 30 000 eŭroj.

Por esti solidara kun ili, mi petas vin subskribi la subtendeklaron malsupre de ĉi tiu mesaĝo.

Insekticido, kiu mortigas la abelojn

En la pasintjara junio por kontraŭbatali hipotezan epidemion de orkolora flaviĝo*, malsano de vinberujoj, la prefekto de Côte-d'Or faris radikalajn decidojn: ĉiuj vinberujoj estu devige traktataj kontraŭ la cikadelo*, insekto kiu disvastigas la malsanon.

La problemoj estas, ke eĉ la malplej poluanta insekticido kontraŭ la cikadelo ankaŭ mortigas la ceterajn utilajn insektojn.

Ĝi detruas ĉiajn insektojn necesajn al la regulado de la vinberujoj por eviti la parazitojn. Nu, Emmanuel Giboulot ekde pli ol 40 jaroj precize agas por konservi la biologiajn ekvilibrojn de siaj vinberujoj.

Ili do tre logike decidis kontraŭbatali la cikadelon* elektante inter la multaj naturaj traktadoj bone konataj de la biologie kultivantaj terkultivistoj.

Pasintsomere ili trankvile laboris, kiam inspektisto de la regiona administracio pri terkultivado aperis ĉe ili. La inspektisto konstatis, ke ili ne ŝprucigis pesticidojn.

Ili decidis tuj sciigi tion al la prokuroro. Emmanuel Giboulot estas pridemandita kiel krimulo.

...

Anstataŭ flankenmeti la aferon, la prokuroro decidis sendi lin antaŭ la deliktopunan tribunalon kun proceso je la venonta 24a de februaro!

La naturaj alternativoj estas efikaj!

Fakte, kontraŭe al tio, kion asertas la aŭtoritatoj, ekzistas pluraj rimedoj por protekti la vinberujojn kontraŭ la cikadelo* dume plene respektante la medion.

la vinberujoj povas esti protektataj per filikoj kaj rostita argilo;

ekzistas efikaj kaptiloj por cikadeloj*, (cikadeloj* estas allogataj de oranĝa koloro);

oni ankaŭ povas meti inter la piedoj de la vinberujoj avenan pajlon aŭ aluminian folion, kies forta lumreflekto malhelpas la insekton meti sin tie. Eksperimentoj montris, ke tiu simpla rimedo estas same efika kiel la insekticido;

Sed precipe per protektado de la biologia diverseco oni plej efike kontraŭbatalas la cikadelojn*, ĉar tiuj estas insektoj ŝatataj de multaj ĉasbestoj en la naturo. La problemoj estas, ke tiuj ĉasbestoj, araneoj, mantoj kaj iuj cimoj, nuntempe estas forigataj el la nebiologiaj vitejoj, kie la faŭno estas ruinigata de la insekticidoj.

Tiuj solvoj estu ne kontraŭataj sed kuraĝigataj de la aŭtoritatoj.

La kultivistoj, kiuj uzas ilin, devus esti gratulataj kaj prezentataj kiel ekzemploj, ne terorigataj de juraj minacoj. Tial mi petas vin subskribi la subtendeklaron por Emmanuel Giboulot.

Bonvolu subskribi la subtendeklaron por Emmanuel Giboulot ĉe

<http://ipsn.eu/petition/viticulteur/index.php>

Emmanuel Giboulot ne iru antaŭ la tribunalon forlasita de ĉiuj. Ili sciuj, ke centmiloj da homoj subtenas lin.

Jes, se vi subskribas la ĉi-suban subtendeklaron, kaj se vi plusendas ĉi tiun mesaĝon al ĉiuj el via adresaro, ni povas estigi historian solidarecan ondon en la lando.

Ni ankaŭ povas ŝanĝi la rezulton de tiu proceso kolektante centmilojn da subtensubskriboj.

Ĉar sen amasa reago de la loĝantaro tiu vinberkultivisto tre verŝajne riskas kondamnon, por ke li estu ekzemplo.

La plimulto de la biologiaj kultivistoj, kiuj vidos tion, sentos sin avertitaj. Ili komprenos, ke ili blinde obeu al la volo de la aŭtoritatoj, eĉ se tio inkluzivas la venenigon de lia propra tereno, kaj plian ekstermon de la abeloj kaj aliaj polenigaj insektoj!!

Ne lasu tian maljuston okazi kun sekvoj tiel gravaj kaj kontraŭaj al la intereso de ĉiuj. Ni publike manifestu nian malaprobegon al la reguloj, kiuj kontraŭas je kaj malutilas al la medio kaj la prudento.

"Institut pour la Protection de la Santé Naturelle" [Institucio por la protektado de la natura sano] solene petas vin subskribi la oficialan subtendeklaron al Emmanuel Giboulot ĉe <http://ipsn.eu/petition/viticulteur/index.php> kaj inviti viajn proksimulojn subskribi ĝin.

Tio koston al vi nur momenton, sed estos konkreta maniero por malhelpi, ke okazos grava maljusto kaj grava atenco al nia planedo.

Mi petas vin ne fermi ĉi tiun mesaĝon por ĵeti ĝin en la rubujon. Tio estus granda perdo. Ĉar vi jam investis tempon por legi la mesaĝon ĝis ĉi tie, faru simplan geston kaj subskribu la oficialan subtendeklaron al Emmanuel Giboulot.

Poste plusendu ĉi tiun mesaĝon al ĉiuj viaj konatoj.

Dankegon, Sincere, Augustin de Livois

Prezidanto de "Institut pour la Protection de la Santé Naturelle"

[Institucio por la protektado de la natura sano]